

## Nokto en la Muzeo la dekan fojon

Ekde 2009 (do 10 jarojn) Muzea Nokto en Svitavy estas nedisigeble kunigita kun teatro DOMA kaj kun loka esperantista klubo. Ĉi-foje la partoprenantoj (pli ol 300 personoj dum unu nokto) revenis en la jaron 1969, konkrete en la 31-an de majo. La tempo estis aflikta, la homoj rilatis pli intime kaj la „malamikon“ (invadajn armeojn de 1968) ili perceptis kiel okupaciantojn.



Ĉe la Muzea Nokto la aŭtoroj strebis per muziko kaj teatro elvoki etoson kaj travivaĵojn de tiu jaro. La jaro 1969 estas ligita kun la nomo de Jan Palach, kun la glora hokea matĉo ĈSSR – SSSR (ĉeĥoslovaka venko 4:3, 2:1), kun estiĝo de skolta centro kaj kun la kontrea muzik-grupo Fialový expres (Violkolora ekspreso).

Ĉion ĉi vi povis travivi vespere la 31-an de majo 2019.

Je la 20-a horo la kontreaj muzikgrupoj de Svitavy malfermis la „vojaĝon en la pasinteco“ kaj la ĉiĉeronoj de Ottendorfer-domo kondukis la vizitantojn tra la historia domo kaj fine transportis ilin en la tempon antaŭ 50 jaroj. En la ĉefa

salono jam atendis tiutempa prezentisto, kiu rememoris personon de Jan Palach, bonvenigis Karlon Kryl kaj liajn kantojn. Poste la programo jam rapidis: elpaŝis du ensembloj de profesorino Votavová, glora personulo de la urbo, la spektaklo kulminas per fabelaj rakontoj: Tri lavistinoj kaj Ludoj kun diablo. Kaj teatraĵoj alternas kun famaj furorkantoj de la 1960-aj jaroj, nome de Karel Gott, Marta Kubišová, Václav Neckář.



La vespero sukcesis. Pli ol 300 spektantoj rememoris kun nostalgio la obskuran kaj samtempe belan periodon de nia lando, Ĉeĥoslovakio.



*Radmila Oblouková  
foto Pavel Dvořák*